

lernu!

Anna Löwenstein

La teorio Nakamura

Fragmento de la dua eldono



Anna Löwenstein

La teorio Nakamura

(Dua eldono)

La baza rakonto, sur kiu baziĝas
la ĉefa kurso de Esperanto de *lernu!*
La reta versio kun multaj ekzercoj
kaj aldonaj tekstoj troveblas ĉe

www.lernu.net

© lernu.net

La teorio Nakamura

Aŭtoro: Anna Löwenstein

Grafika aspekto: *lernu!*

Kopirajto: lernu.net

Enhavo

| | |
|-----------------------------------|----|
| Kio estas tio? | 5 |
| Mi estas vi..... | 6 |
| Ĉu tio eblas? | 8 |
| Mi ne kredas!..... | 10 |
| Ek! | 12 |
| Surprizoj..... | 14 |
| Kia ĝojo! | 16 |
| Embaraso | 20 |
| Frenezaj hararoj..... | 24 |
| Urbo sen aŭtomobiloj..... | 28 |
| En kinejo | 32 |
| Kie manĝi? | 35 |
| Viando el fabriko | 38 |
| Tasoj de IKEA | 41 |
| Kiu estas Lunjo?..... | 44 |
| Rerenkontiĝo..... | 47 |
| La ĉarmo de la 20a jarcento | 51 |
| Malsano..... | 55 |
| Sandviĉo kun ovo | 60 |
| La teorio Nakamura..... | 65 |
| Nedezirata konsilo | 68 |
| Lunjo..... | 72 |
| Kafo kun lakto..... | 76 |
| Tro rapida semajno | 79 |
| Malfacila klarigo..... | 83 |
| La lasta programero..... | 86 |

Kio estas tio?

Filipo sidas en ĉambro. En la ĉambro estas tablo, seĝo, lito, vesto-ŝranko kaj libro-breto. Gitaro kuŝas sur la lito. Sur la muro estas bela afiŝo pri koncerto. La ĉambro estas en studenta loĝejo. Ĝi estas bela kaj moderna, sed malgranda kaj ne tre pura.



Sur la tablo estas komputilo. La komputilo estas tre granda. La jaro estas 1982 (mil naŭcent okdek du).

En la ĉambro estas stranga bruo. Stranga bruo kaj stranga lumo. Kio okazas?

Aperas en la ĉambro granda ŝranko. Kio okazas? Kio estas tio?

Mi estas vi

Filipo rigardas. Li krias. Li timas.



Viro venas el la ŝranko. “Saluton, Filipino,” li diras.

Filipo timas. “Kiu vi estas?”

La viro diras, “Mi estas Filipino Nakamura.”

Filipo krias, “Sed tio ne eblas. Mi estas Filipino Nakamura!”



La viro diras, “Jes, vi estas Filipino Nakamura. Sed ankaŭ mi estas Filipino Nakamura. Ni estas Filipino Nakamura. Mi estas vi. Mi venas el la jaro 2012 (du mil dek du).”

Filipo svenas.

Ĉu tio eblas?

“Filipo! Filipo!” La maljuna Filipo parolas al la juna Filipo. “Ĉu vi estas en ordo?”

La juna Filipo kuŝas sur la planko. “Ne, mi ne estas en ordo. Mi estas freneza. Kiu vi estas?”

“Vi ne estas freneza. Mi estas vi mem. El la jaro 2012.”



La juna Filipo estas alta kaj maldika.

Ankaŭ la maljuna Filipo estas alta, sed li estas iom pli dika,

kun grizaj haroj kaj malgranda griza barbo.

Estas laŭta bruo. La bruo venas de la granda ŝranko, kiu staras en la ĉambro. La junulo demandas, “Kio estas tio?”

“Tio estas tempo-maŝino. Ĝi vojaĝas tra la tempo.”

“Sed tio ne eblas!” diras la junulo.

“Jes, tio eblas. Mi venas el la jaro 2012. Nun, en 1982, vi estas studento pri fiziko. Sed post tridek jaroj vi estos fama fizikisto kaj esploristo.”

Tio estis mallonga fragmento de la rakonto.

La plena versio de la rakonto kun tradukoj al multaj lingvoj kaj aldonaj materialoj, sondosieroj kaj multaj ekzercoj troviĝas ĉe **www.lernu.net**

La informoj pri la libro kun klarigoj pri tio, kiel aĉeti ĝin, troviĝas ĉe **<https://lernu.net/libro>**



Esperanto?

www.lernu.net

Multlingva paĝaro por lernado
de la internacia lingvo Esperanto.